

Kluba Bulteno

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 4 2012

Ĵaŭdon la 11an de oktobro

60a jaro

Reviziita kalendaro

Pro diversaj kaŭzoj ni devis fari plurajn ŝanĝojn en la kalendaro anoncita en numero 3.

La kunvenoj komenciĝos je la 19a horo.

Kie? / Hvor? – vd. la lastan paĝon / *se siste side*.

(Lundojn la 15an de oktobro kaj 5an de novembro (sem. 42, 45) **Neniuj kunvenoj.**)

Lundon la 22an de oktobro (semajno 43) – **mandag** (den 4. i måneden)

Raporto de Douglas pri la jarkunveno de la E-gastigejo/kursejo en Lesjöfors la pasintan semajnfino. *Rapport om årsmøtet til Esperantogården i Lesjöfors forrige helg,*

Lundon la 12an de novembro (sem. 46) – **mandag** (den andre i måneden)

.Algis Kaspiravičius prezentos sian lingvon, la litovan. *Algis Kaspiravičius presenterer det litauiske språket.*

Lundon la 3an decembro (sem 49) – **mandag**

Ĉu estas bezono de politike ne-neŭtrala E-asocio en Norvegio, kiu povus membri en i.a. *Norges sosiale forum* kaj *Forum for utvikling og miljø*, eventuale aligita al la per-Esperanta SAT? *Er det behov for en politisk nøytral esperanto-organisasjon, som kunne være medlem av f.eks. Norges sosiale forum og Forum for utvikling og miljø, evt. tilknyttet det radikalt politiske SAT?*

Lundon la 17an de decembro (sem.51) – **mandag**

Literatura kunveno. Ĉiu prezentu libron. *Litteraturmøte. Alle presenterer en bok.*

Lundon la 7an de januaro (semajno 2) – **mandag**

Kion ni povos fari en 2013, la norvega Lingvojaro (200-jara datreveno de Ivar Aasen)? *Hva kan vi gjøre i 2013, det norske Språkåret (200-årsjubileet for Ivar Aasen)?*

OKAZIS

La 17an de septembro

La anoncita temo estis niaj travivaĵoj dum la somero: Ni aŭdis pri restado en Litovio, adventista jarkunveno en Røyse (Ringerike), uzo de la angla en Sagene kaj informado per mondo-mapo en la biblioteko de Bjerke. .

La 1an de oktobro

La temo estis la ofta demando "Kiom da homoj en la mondo parolas Esperanton?"

Unue Asbjørn raportis el sia esploro en Vikipedio, kie li trovis pritaksojn de pluraj esplorintoj. Necesas specifi ĉu temas pri eklernintoj, fluparolantoj ktp. kaj ĉiukaze eblas indiki nombrojn nur tre krude, preskaŭ nur

laŭ potencoj de 10. Ĉar la plej multaj esperantistoj ne estas denaskuloj, sed lernis Esperanton kiel fremdlingvon, mankas priaj censoj. Pro la granda necerteco iuj trovas la demandon nerespondebla kaj limigas sin al la nombroj de membroj, de abonantoj aŭ lernantoj ĉe interreta kurso kiel *lernu*, kvankam krom tiuj certe estas multaj kaŝ-esperantistoj. Aliaj opinias ke ni ŝuldas al nesciantaj demandantoj doni ian impreson, kiom ajn malekzaktan.

Aldone al la nombroj, ni atestu ankaŭ pri la ebloj de facila kontakto kaj konatiĝo, per la delegita reto, lokaj kluboj aŭ internaciaj kongresoj.

DD

Landa kongreso en Oslo 2013 – laborgrupo?

Venontjare nia klubo aranĝos la landan kongreson de NEL en Oslo, 14. – 16. junio (semajno 24). Ni jam mendis kunvenon en la migrula hejmo Haraldsheim (proksime de Esperantonia), sed ni bezonas laborgrupon kiu planu kaj organizu ekskurson kaj vesperan programon sabaton.

Povos esti mallonga ekskurso sabaton kaj/aŭ pl longa dimanĉon post la fino de la laborkunsidoj, eventuale al Gamle Hvam agrikultura muzeo, kie la estro, Tom Jøran Bauer, estas membro de nia klubo. Por la sabata vespero la estraro de NEL "atendas ke okazos festeno laŭ la tradicio dum sabato vespere, kun programeroj". Se vi interesiĝus helpi plani tiun "kulturan" flankon de la kongreso, bv. anonci vin al nia oficejo.

PÅ NORSK: *Vi trenger en liten arbeidsgruppe som kan planlegge en utflukt og en festkveld under landsmøtet i Oslo neste år. Interesserte, meld dere til kontoret!*

Info-budo en la konferenco pri tutmondiĝo

Sabaton la 15an de septembro ni deĵoris trio pe sur t.n. *Lokalbenken* en Bjerke biblioteko . Efektive informbudo, sed ĉi-foje ni aktivigis la preterpasantojn, petante ilin diveni kiom da urboj en diversaj landoj havas E-kontaktulon (do UEA-delegiton). Kaj iom post iom ni transmetis slipetojn kun tiuj nombroj al monda mapo. Tiel tiuj kiuj kutimas repliki: "Esperanto? Tio estis tre bone ideo, domaĝe nur ke neniuj parolas ĝin" povis rekte vidi, ke troviĝas E-medioj en ĉiuj mondopartoj, kaj en Eŭropo sufiĉe dense. Intervjuo, kun bildo, aperis en la loka gazeto, *Akers Avis*, la postan merkredon.

Lastjare ne okazis *Globaliseringskonferanse*, sed nun jes, post tri semajnoj, kaj ankaŭ ĉi-foje ni esperas pri taŭga loko por informbudo.

Tiajn aranĝojn kaj fioprojn ni bezonas, sed bedaŭrinde ili ne tre oftas. Foje ili okazas loka, for de la urbocentro, ekz-e en loka biblioteko. Se vi scias pri ia tia aranĝo, kie eblus starigi informbudon, bv. sciigi tion al ni.

Si fra om du vet hvor vi kan få satt opp en liten utstilling eller info-bod.

La jubile-jara informkampanjo *Jubileumsåret 2012 – info-kampanje*

Kartetoj

Ni memorigas: ni ankoraŭ havas abundan stokon da kartetoj (dissend-itaj kun *N.E-isto* 2 kaj 4), kiuj montras la jubile-jaran interret-adreson esperanto125.com, por disdonado aŭ dispendigado en ingoj sur afiŝtabuloj. Do venu kaj prenu! Aŭ se vi mendos, ni sendos. (La afrankon kovros legaca asigno.)

Ankaŭ **flugfoliojn** ni havas. Kaj glu-markojn.

Jubileumskortene

Vi minner om at vi har et stort lager med de små kortene (som alle fikk tilsendt sammen med Norvega E-isto 2 og 4), som viser adressen til jubileumsnettsiden esperanto125.com Kortene er til utdeling eller til oppslagstavler. Så det er bare å komme innom og forsyne seg. Eller vi kan sende i posten (portoens dekkes av bevilgningen fra legatet).

Vi har også løpesedler og plakater.

Ĉu iu volas lui kunvenĉambron? – leie møterom?

Kjenner du noen som kunne være interessert i å leie møterommet vårt for én eller flere kvelder? Eller en helg? Vi trenger leieinntekter!

Postkongreso venontjare en Oslo?

Ĉu iu volas helpi?

Cato Haugen skribas:

Mi esploras eblecojn aranĝi 3-tagan postkongreson en Oslo en 2013 post la UK en Rejkjaviko. Mi planas havi turisman gvidadon en kaj ĉirkaŭ Oslo, similan al tiu en 2011 post la UK en Kopenhago. Mi proponos tekston por la *Dua Bulteno* (kiu aperos en januaro) kaj sendos ĝin al UEA.

Se vi volas helpi prepari aŭ gvidi la aranĝon, bv. kontaktiĝu kun mi (retpoŝte <pluto8008[a]gmail.com> ([a] = @) aŭ letere/telefone).

Eble ankaŭ aviadila ekskursego al Svalbardo, se mi trovos akcepteblajn prezojn?

– Cato Haugen (rajtigita ĉiĉerono pri Oslo)

En la vendobretaro

Libroj

– Nova kaj tute modernigita eldono de la granda *Bildvortaro* 310 kr.

– *Kalevala* (la klasike finna eposo) bonkvalite bindita. 90 kr.

– Lars Forsman: *Esperanto .. 50 miljoner träffar*, pri lia 18-jara sperto kiel Esperanto-instruisto en la popola altlernejo de Karlskoga, (*på svensk om hans 18 års erfaringer som esperantolærer på Karlskoga folkehøyskole*). 95 kr.

– kaj multaj aliaj lernolibroj, vortaroj, literaturo.

T-ĉemizoj Tekstoj: *Vi snakker esperanto. Gjør du? Esperanto er kult. Esperanto la internacia lingvo* Po 100 kronoj, ĉiuj.

Glumarkoj: ruĝaj (4 x 7 cm), por valizo, (dorso)sako, teko po 2 kronoj;

Kunvenejo ("Esperantonia") Olaf Schous vei 18 (enirejo en Schouterrassen) en Sinsen. Buso 31 aŭ tramo 17 al Rosenhoff kaj de tie iru supren laŭ Båhusveien; aŭ iru malsupren de Sinsen T (buso, metroo) aŭ de la haltejo Sinsenterrassen (nur tramo) laŭ la samnoma flankstrato.

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo.Tlf. 22 35 08 94
www.esperanto.no/oslo Retpoŝto: <oficejo[a]esperanto.no>
Bankkonto 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL/*Forbundet* 0533 05 22870).